

& Mia lingvo:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Nikolao Nekrasov (La Nova Epoko, N-ro 3, oktobro 1922). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,7:37> (/Mi MiMi LaTi doTi La;do TiMi MiMi MiFi SoSo; La LaTi LaSo SoFa Mi;Fa SoMi MiMi ReDo ReRe;

(#Rekantaĵe: Mi LaLa LaTi LaSo So; Mi MiMi MiFi SoSo; MiRe ReMi Do DoRe Mi; LaLa SoSo La La a)

)×8)+

(& Strofoj:

'1 /Ĉe sfero, kie vibras lim' ; De homparolo ordinara, ; Ekplantis mi en la anim' ; La lingvon de spirit' homara.

(×: **Tretu kviete en la ĉen' ; Paŝu en vigla vico ; Dume kreskas verda arbar' ; kun radikoj vastaj.**)

'2 Al mia slava patrolang' ; Mi faris profundegan tranĉon ; Kaj al trunket' en ruĝa sang' ; Mi inokulis verdan branĉon.

'3 Sed kiel plej natura hom' ; Suĉinta el patrina mam, - ; El la sovaĝa idiom' ; Elkreskis mia nova amo.

'4 El profundej' de loka hum' ; Al la trunket' inokulita ; La suko fluas, kiel rum' ; Kaj fermentad' embri-incita.

'5 Ĝi fluas, verda tera suk' ; Fariĝas hele rozkolora ; Kaj ekburĝonas ŝelveruk' ; Per flor' mirinde dolĉodora.

.....

'6 Klinite ie sur dekliv' ; Mi kreskas ĉe naturkloakoj, ; Sed vaste al tutmonda viv' ; Sin tiras miaj branĉoj-brakoj.

'7 Per tiu mondoventa tuŝ' ; Putriĝas mia homosenco ; Grandega frukt' el mia buŝ' ; Plimaturiĝas de komenco.

.....

'8 Do floru lukse kaj sen tim', ; Burĝonu malgraŭ la naturo, ; Inokulita lingvanim' ; De l' tuthomara vivkulturo.)